*Julio 2024 • n-ro 01/2024*

# KONGA STELO

## Etoile du Congo



*Trimonata informilo de DKEJO (Demokratia Kongolanda Junulara Organizo) kunlabore kun aliaj kongolandaj organizoj.*



## Ĉefaj temoj

**Mallonge pri Esperanto kaj movada strukturo, p. 2**

**Proponoj pri dispolusigo de DKEA, p. 3**

**Pri la ĝenerala vivo en Rutshuru, p. 7**

**Tago de Esperanto : Mesaĝo de UEA, p. 9**

**Pri la unua kaj unika UK en Afriko, p. 11**

**Leciono pri la Svahila : Salutoj, p. 14**

## Redakcie

***Joel Muhire kaj Espoir Ngoma Kasati***

Saluton karaj,

Kiel vi scias, en la laborplano de la Estraro de DKEJO *(Demokratia Kongolanda Junulara Organizo)* estis planita aperigo de informilo nomata "*Konga Stelo*", organo kiu celas helpi al kongolandanoj informiĝi pli regule pri la enlanda E-movado kaj fervorigi junulojn daŭre movadumi. Por sukcesa atingo en nia poresperanta agado, necesas kunlaboro inter ĉiuj ĉefmotoraj asocioj: DKEA*, la Landa Asocio kaj ILEI-Sekcio* en DR Kongo; tial ĉi tiu informilo estas por ĉiuj kongolandanoj kaj utilos ne nur por Esperantaj agadoj, sed ankau kiel amuzilo kaj plibonigilo de nia lingvokapablo.

En D. R. Kongo Esperanto vivas de pluraj jardekoj, sed tamen tion multaj ignoras pro neinformiteco, aliaj ne kuraĝas plumovadumi pensante ke ili estas la solaj esperantistoj en la lando. Tiu ĉi informilo pruvos pri tio la malon !

Ĝi entenos alterne diversajn temojn, inter aliajn:

1. Kulturo kaj naturo (manĝaĵo, vivmaniero, bredado, ktp),
2. Amuzaĵoj – ŝercoj,
3. Lingvoj: mallonga kurso de nacia(j) lingvo(j) pere Esperanto,
4. Korespond-petoj,
5. Rakontoj, ne nur fikciaj.

Do, ni invitas ĉiujn junajn kaj nejunajn kongolandajn geesperantistojn ĉiam akurate sendi siajn kontribuaĵojn kiuj konsistu el artikolo de unu paĝo maksimume kun fotoj.

Konga Stelo estas por vi kaj dependas de vi, tralegu ĝi, diru kio plaĉis al vi kaj kio mankas en ĝi. Viaj proponoj helpos plibonigi la estontajn informilojn.

Dankon al ĉiuj kiuj kontribuis en ĉi tiu informilo, kaj ni petas pri plua kontribuo !

### Kiel sendi kontribuaĵojn al *Konga Stelo?*

- ✓ Prefere sendu tekston originale verkitan en Esperanto kun foto/bildo memfarita.
- ✓ Se vi sendas tradukaĵon, bv. indiki la originajn fontojn, lingvon kaj aŭtoron. Pri fabelo indiku, ĉu ĝi estas popola (kaj de kiu popolo) aŭ verkita de vi.
- ✓ Fotoj devas esti bonkvalitaj. Ne forgesu aldoni la nomon de la artisto aŭ de la fotinto!
- ✓ Bonvolu sendi vian artikolon rete kiel kutiman retmesaĝon aŭ en format RTF.

Viajn artikolojn sendu al *joelmuhire0@gmail.com* kun kopio al *espoirkasati@gmail.com* plej laste je la fino de ĉiu tria monato.

**Koran ntaŭdankon pro via kontribuo!**

**DKEA:** Demokratia Kongolanda Esperanto Asocio.
**ILEI:** Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj.

# Mallonge pri Esperanto kaj Movada Strukturo

***Joel Muhire – Goma***



***1. Kiam Esperanto naskiĝis?***

La 26an de julio ĉiu-jare esperantistoj memor-festas la Esperanto-tagon. Tiu dato markas la oficialan aperon de Esperanto, per publikiĝo de la unua libro, en 1887. Ĝia kreinto, Ludoviko Lazaro Zamenhof estis juna kuracisto naskiĝinta la 15an de decembro 1859, en Bjalistoko, Pollando.

***2. Kial Zamenhof kreis Esperanton?***

Per Esperanto Zamenhof esperis *«forigi la murojn inter la gentoj kaj alkutimigadi la homojn ke ĉiu el ili vidu en sia proksimulo nur homon kaj fraton»,* do per la lingvo neŭtrala ĉiu sentu sin frato al aliaj kaj justeco regu inter ĉiuj popoloj.

En la unuaj jardekoj de Esperanto, ĝi evoluis jam laŭ ĝia propra vojo kaj en 1905 okazis la unua Universala Kongreso de Esperanto, en Bulonjo ĉe maro, Francio. Zamenhof forpasis en 1917 pro malsano, dum la unua mondmilito. Ĉi-jare estas la 137a naskiĝdatreveno de Esperanto!

## LA NUNA STRUKTURO DE LA ESPERANTO-MOVADO

- En 1908 fondiĝis *UEA, Universala Esperanto Asocio* de Hector Hodler, kiel organizaĵo de individuaj esperantistoj. Nuntempe ĝi havas membrojn en 120 landoj. Ĝi laboras por disvastigi Esperanton, ankaŭ por veki diskuton pri la monda lingva problemaro kaj atentigi pri la neceso de egaleco inter lingvoj. UEA havas oficialajn rilatojn kun UN kaj UNESKO kaj organizas Universalajn Kongresojn, ĉi-jare la 109a Universala Kongreso de Esperanto okazos por la unua fojo, en Afriko, pli precize en Aruŝo, Tanzanio de la 3a ĝis la 10 de Aŭgusto 2024.

- UEA estas reprezentita en apartaj kontinentoj de komisionoj (afrika, amerika, eŭropa, ...). Ĉi-lastaj laboras kun la landaj asocioj, kuraĝigante ilin en iliaj por-esperantaj agadoj kaj postulante ĉiu-jarajn raportojn, ĝi penas revivigi tiujn kiuj jam ne plu funkcias kaj sendas lernomaterialojn al la petantoj. La Landaj Asocioj konsistas el aktivaj esperantistoj en iliaj respektivaj kluboj kaj lokaj asocioj. La kluboj aŭ asocioj organizas sin por ke ĉiu membro gajnu, tamen en spirito de frateco kaj justeco, laŭ la interna ideo de nia lingvo.

***Pli pri UEA vidu en: www.uea.org kaj ILEI en : www.ilei.info***

Movado

# Proponoj pri dispolusigo de DKEA

***Espoir Ngoma Kasati – Lubumbaŝo***

Ĉi tiu informo venas al vi por sciigi vin pri io!
Kiel vi ĉiuj eble scias, por ke ĉiu popolo evoluu, ekzistas universalaj principoj, kiujn tiu popolo akceptas por modifi aŭ korekti praajn praktikojn, kiuj iel ne helpis al bona progreso de la komunumo. Foje, okazas, ke eĉ niaj denaskaj moroj bremsas nian evoluon, do, ni ne povas prisilenti tion kaj nur esperi je miraklo : nia propra konscio bone funkcianta devas enkonduki ŝanĝon por la disvolviĝo de nia komunumo. Tial niaj landoj havas konstituciojn (modifeblajn aŭ ŝanĝeblajn se ĝia enhavo jam ne helpas en iu certa periodo), niaj organizaĵoj havas statutojn kaj reglamentojn, niaj kutimoj staras kiel leĝoj; aldoniĝas al tio la ĝeneralaj principoj, kiuj evitigas al ni damaĝojn. La Deklaracio pri Homaj Rajtoj, la internacia kortumo, la Konsilio de Unuiĝintaj Nacioj, ktp, ĉio venas por plibonigi nian mondon. De post iu certa periodo, ni trovas, ke DKEA estas aktiva sed ĝia membraro ne laboras enasocie kiel devus nepre esti. Ja klaras ke povas naskiĝi diversaj fakgrupoj, kiuj disvastigas Esperanton, sed ni ne forgesu ke DKEA estas nia tegmento, jure konata. Konstantinte tiun unuopulemon de la agado en Kongo-kinŝasa, iuj kongaj esperantistoj (kiuj preferis konservi sian anonimecon) proponis krei LIGOJN por DKEA. Jen la proponoj :



1. DKEA konsistu el Ligoj
2. La Estraro de DKEA estu elektitata de la Ligoj kaj estu homoj, kiuj aktive servas en siaj respektivaj ligoj.
3. Ligoj estu : Okcidenta, Orienta, Suda kaj Norda
4. Lig-estroj estu klub-estroj
5. Kluboj raportu al siaj Ligoj kie ili apartenas.
6. Ligoj raportu al DKEA.
7. Ĉiuj decidoj, kiujn proponos la ligoj estu aprobitaj de DKEA por efektiviĝo.

## Proponoj pri renkontiĝoj

Pro la fakto, ke la interprovinca veturado estas multekosta kaj ofte peniga, venis jenaj proponoj :

1. Ĉiudecembre okazu Landa renkontiĝo. Tiu renkontiĝo ne okazu samjare en ĉiuj funkciantaj ligoj.
2. La buĝeto de la renkontiĝo egalu por ambaŭ ligoj por eviti financajn konfliktojn.
3. Dum iu renkontiĝo, la organizanta ligo devas enviti unu aŭ du membro(j)n de la najbara ligo.

***Ligoj strukturiĝu jene :***

Nuntempe, du partoj estas aktivaj, do estu du Ligoj (laŭ tempopaso aldoniĝos aliaj ligoj).

***1. Ligo de Okcident-Kongaj Esperantistoj*** konsistu el jenaj urboj :
- Kinŝaso
- Lubumbaŝo
- Banza Mkungu
- Lukala
- Kolwezi, ktp.

***2. Ligo de Orient-Kongaj Esperantistoj*** konsistu el jenaj urboj :
- Kindu
- Kalemi
- Baraka
- Uvira
- Kiliba
- Bukavu
- Goma
- Rutshuru (Kiwanja), ktp.




● Ĉiu ligo estu gvidata de :
- Lig-estro
- Vicligestro
- Sekretario
- Vicsekretario
- Kasisto
- Merkatikisto
- Interliga rilatisto (en rilato kun la raportisto de ligoj)
- Respondeculo pri kluboj.

● Al la estraro de DKEA-konsisto aldoniĝu : Raportisto de ligoj.

Tiu propono efektiviĝu antaŭ la UK en Tanzanio.



**Espoir Ngoma Kasati** estas membro de la Afrika Komisiono de UEA, komisiito de TEJO pri edukado kaj DRK-Seretario de la DKEJO.

## Proponoj de Bukuru Nabahena

***1) DKEA konsistu el Ligoj***
Agi pere de Ligoj povas okazigi laŭleĝajn problemojn, eble se tio estos aranĝita alimaniere. Laŭ mi, estiĝu "DKEA Sub-Oficejoj", do, la nomon " DKEA" portu ties tavoloj aŭ branĉoj de la Asocio anstataŭ uzi la nomon "Ligo". Tiulasta povas soni kiel aparta strukturo, kiel aparta asocio malsame al DKEA. Kaj, se tiel, funkciigi Ligojn povas necesigi akiron de apartaj oficialaj/juraj funkcpermesiloj. Do, estus bone, ke tiuj Ligoj portu la nomon mem de DKEA kiel mi jam diris kaj ke ĉe ĉiu "DKEA Loka Oficejo" estu kopioj de funkcipermesiloj kaj, se eble, statutoj de DKEA. Mallonge, tiuj regionaj tavoloj funckiu kiel eklezio. En tiuj kondiĉoj esperantistoj estos tute liberaj okazigi diversajn priesperantajn aktivecojn laŭ tio, kio antaŭvidas DKEA. En nia lando, esperantistoj, ĝis nun, penas estigi klubojn sed nur kvazaŭ virtualaj ĉar ili ne estas oficiale/jure agniskitaj de nia registaro kaj sekve tute ne estas permesite okazigi ian agadon. Foje ili okazigas tion kvazaŭ kaŝe.

***2) La Ligoj lokiĝu ne nur okcidente, oriente, norde kaj sude sed ankaŭ centre.***
DR Kongo estas kvazaŭ-kontinenta lando. Pluraj grupiĝoj faciligos la laboron. Cetere, ligi Kindu-n aŭ Kalemi-n kun Uvira, mi ne pensas ke temas pri bonega grupiĝo. Estus bone, ke la grupiĝoj estu pli malpli proksmaj inter siaj grupitaj lokoj por faciligi renkontiĝojn.

***3) Dum iu renkontiĝo,*** mi pensas ke la partopreno de aliaj samideanoj ne havu devigan karakteron sed male nepru la partopreno de Delegito de la Centra Oficejo ĉe ĉiu okazigata renkontiĝo. Tamen, tio ne estu motivo de la koncernata tavolo ne submeti sian prieventan raporton al DKEA Oficejo. Tiupunkte, mi eĉ proponus, ke grupiĝoj estu prefere establigitaj laŭ ĉiu Teritorio kaj, ke je ĉiu provinca nivelo estu Provinca Delegito kiu penu partopreni en ĉiu teritoria renkontiĝo de sia provinco. Al li raportoj el teritorioj estu submetitaj kaj siavice, li/ŝi submetu ties teritoriajn raportojn al la Centra Oficejo de DKEA en Kinŝaso. Laŭ tiu modelo, la Centra Oficejo, sekvos ties agadojn faritajn de ties surlokaj DKEA lokoficejoj kaj tiel havi pli malpli ekzaktan ideon pri la nivelo de progreso de la agadoj fare de ĉiu teritorio, do, de ĉiu provinco. Niaj teritorioj estas tiom grandaj kiel iuj najbaraj landoj. Do, grupiĝoj laŭ teritorioj povas helpi bone strukturi ties DKEA-agadojn tutlande.

***4) Laŭ mi, la buĝeto normale ne estu sama***, sed estu ĉiam adaptita je la viglecnivelo de ĉiu teritorio/provinco. Estas absurde, ke iu grupo kiu preskaŭ centporcente stagnis estu subvenciita samnivele kiel tiu, kiu fervore agadis kaj produktis aplaŭdindajn fruktojn ! La Centra Oficejo povas ekzemple estigi iun apartan virtualan/retan informilon pri ties enlandaj agadoj pere de lokaj agadoj, listigitaj laŭ teritorioj aŭ laŭ provincoj. Tiel, ne tro aktivaj lokgrupoj devos nepre konsciiĝi pri la agadoj faritaj de aliaj grupoj en aliaj teritorioj/provincoj kaj ankaŭ kompreni la kialon de la malsameco de la liveritaj subvencioj. Tiu fakto povas eĉ iel

stimuli neagemajn grupojn aktiviĝi, precipe se ili sciiĝas ke pliaktivaj grupoj estis altkvante subvenciitaj kompare al la maniero ili estis zorgitaj de la Centra Oficejo en Kinŝaso.

***5) Vi proponis, ke la Estraro de DKEA estu elektitaj de la Ligoj*** kaj estu homoj kiuj aktive servas en siaj respektivaj ligoj. Bone, sed ĉu vi pensas, ke facilas establi iun el fora provinco al Kinŝaso? La Centra Oficejo devus esti prizorgita de surlokaj samideanoj, tiel ili povas bone zorgi pri la tuta DKEA-Strukturo. Tamen, ties Provincaj Respondeculoj de DKEA povas esti konsiderataj kiel Delegitoj de iliaj respektivaj provincoj ĉe (la Estraro de) DKEA. Sufiĉas estigi virtualan forumon tiucele kie la Estraro povas, laŭbezone, konsulti tiujn provincajn delegitojn pri ĉio kio rilatas kun la vivo de nia tutlanda Asocio. Kiam rimedoj permesas, fizikaj renkontiĝoj inter la Estraro kaj la provincaj Delegitoj povas esti okazigitaj.

**KROMAJ VORTUMOJ:**

1. DKEA bone pripensu la strategion daŭre enspezigi monon en la Centra Kaso favore al nia tutlanda Asocio;
2. Kiam rimedoj en la Kaso ne estas ankoraŭ sufiĉaj por kovri la necesajn bezonojn de la Asocio tutlande, plej bone unue prokrasti la disdonon de subvencioj ĝis kiam estos almenaŭ iom da por ties jam establigitaj lokaj grupoj. Tio, laŭ mi, estas kio povas malkontentigi la neservitajn grupojn. Sed, laŭkaze, eblas tion fari post interŝanĝoj kun la Provincaj Delegitoj.
3. Fine, mi diru, ke lokaj E-grupoj nepre bezonas iujn decajn subvenciojn. Iam DKEA informis al mi, ke estas apenaŭ 170 aŭ 190€. Mi ne plu bone memoras la ciferon. Sed, kun tiom da mono, kiel apartigi ĝin al ties grupoj kaj ebligi realan laboron? Eĉ kiam donanconto anoncas sin iel helpi, DKEA-Estraro unue informu al ili pri la grandeco de nia tutlanda Asocio kaj ties urĝaj bezonoj. Alie, la koncernata mondonaco riskas provoki malkontentiĝojn al iuj el niaj grupoj kiam nezorgeme mastrumita, aŭ esti konsiderata kiel hobio, infanludo ! En ĉio, kvankam senrimedaj afrikanoj, en iuj situacioj, ni estu seriozaj kun ni mem. Kaj, preter ĉio, bonaj strategioj estu pripensitaj kiuj ebligu financan forton en nia Asocio, favore al ties E-grupoj!

## Kia mirindaĵo

Evidente, ke eĉ bestoj komprenis la signifon de paca kunvivado kaj socia kuniĝo. Kial la homaro neniam povas efektivigi ĉi tiun pacan kunvivadon kaj socian koherecon ?
Kien ĉi tiu mondo iras !
Troa milito persistas tutmonde celante profiton.
Esperantuje, ni apliku zamenhofan principon.
Amu unu la alian.

*Honoré Sebuhoro*



Kulturo

# Pri la ĝenerala vivo en Rutshuru

***Joel Muhire – Goma***

Rutshuru situas geografie en la provinco Norda Kivuo norde de la urbo Goma, en la oriento de Kongo Kinŝaso kaj najbaras al Ugango kaj Ruando. Tiu teritorio estas subdividita en du ĉefaj regionoj: Bwito kaj Bwisha.

***La ĝenerala vivmaniero de Rutshuru-anoj!***

- **Agrokulturo:** La plejparto de la loĝantaro vivas el terkultivado. La ĉefaj aĵoj kultivataj estas maizoj, fazeoloj, sojoj, maniokoj, sorgoj ktp.

En unu jaro estas du kulturaj sezonoj: la malgranda kiu komenciĝas en februaro gis julio, kaj la granda kiu komenciĝas kutime en aŭgusto kaj finiĝas en januaro. La pleparto de la terkultivistoj luuzas kampojn de bienposedantoj kontaŭ mono kaj ĉe la komenco de ĉiu kultura sezono renovigo de la pago estas nepra!

Io bedaŭrinda: en la periodo de rikoltado, la prezo de la grenoj draste malpliiĝas. Aĉetantoj el la najbaraj landoj kaj urboj trudas sian aĉetokoston, ke la terkultivistoj forvendas siajn rikoltaĵojn bedaŭrante, sed kiam malsato komencas turmenti homojn en la komenciĝanta sekva kultura sezono, la prezo de la manĝaĵo plialtiĝas. El tio estas komprenebla ke terkultivistoj estas la plej kompatindaj en tiu regiono.

Krome, en Rutshuru oni kreskigas ankaŭ diversajn legomojn kaj fruktoj: brasikojn, avokadojn, mangojn, tomatojn, bananojn, ktp.

- **Komerco:** kelkaj homoj havas kioskojn kaj vendas diversajn varojn; vestaĵojn, ŝmiraĵojn, salojn, sukerojn, ladojn, najlojn ktp enportitajn el la najbaraj urboj Goma, Butembo, kaj el la najbara lando Ugando. Brokantistoj kaj ŝufaristoj ne mankas. Aliaj homoj okupiĝas pri mobilaj servoj por povi vivteni sin. En la urbetoj troviĝas hoteloj, restoracioj, ceremoniejoj kaj gastejoj.

- **Veturo:** nuntempe, motorbicikloj estas preferataj por veturi tien kaj reen. Veturiloj estas nur privataj al riĉuloj. Ŝarĝaŭtoj estas uzataj por transporti grenon kaj alispecajn manĝaĵojn kaj varojn en la urbojn kaj en Ugandon.

- **Lernejoj:** En Kongo malfacile troveblas laboro, pro tio multaj studentoj preferas sekvi pedagogian fakon ĉar lernejoj multas en Rutshuru. Bedaŭrinde, nuntempe lernejoj ne plu korekte funkcias ekde la eksplodo de la milito kaj multaj estas senlaboraj.

- **Lingvoj:** En Rutshuru estas multaj bantuaj triboj, la plej grandaj estas tiu de hutuoj kaj Nande. Ĉiu tribo havas sian lingvon sed la svahila servas kiel pontolingvo. Esperanto estas apenaŭ konata en Rutshuru. Ekde 2009 funkcias

Verda Stelana Klubo, ekde 2017 funkcias Rondo Esperantista de Kiwanja kaj Kasasa Esperanto Klubo. De 2012 ĝis 2019 okazis radioelsendoj pri Esperanto en diversaj lokaj radiostacioj en Kiwanja, sub la gvido de Joel Muhire.
Nuntempe, pro la akriĝo de la milito en Rutshuru, kaj en la najbaraj teritorioj ; la Esperanto-movado iom ŝrumpas en tiu teritorio, kaj multaj el la aktivaj klubanoj jam disfuĝis. Ĉio renormaliĝis kiam la milito finiĝos.




**Joel Muhire** estas e-instruisto kaj la kongolanda ILEI-sekciestro. Li estas krome muzikisto.

## PORTRETO DE KURAĜA VIRINO (Verkita de H. Sebuhoro)

Se iu trovis kapablan edzinon,
Ŝia valoro estas pli granda ol perloj.
Fidas ŝin la koro de ŝia edzo,
Kaj havo ne mankos.
Ŝi redonas al li bonon, sed ne malbonon,
En la daŭro de ŝia tuta vivo.
Ŝi serĉas lanon kaj linon,
Kaj volonte laboras per siaj manoj.
Ŝi estas kiel ŝipo de komercisto ;
De malproksime ŝi alportas sian panon.
Ŝi leviĝas, kiam estas ankoraŭ nokto,
Kaj ŝi disdonas manĝon al sia domanaro
Kaj porciojn al siaj servantinoj ;
Ŝi pensas pri kampo, kaj aĉetas ĝin;
Per la enspezoj de sia mano ŝi plantas vinberĝardenon.
Ŝi zonas siajn lumbojn per forto
Kaj fortikigas siajn brakojn.
Ŝi komprenas, ke ŝia komercado estas bona;
Ŝia lumilo ne estingiĝas en la nokto.
Ŝi etendas sian manon al la ŝpinilo,
Kaj ŝiaj fingroj tenas la ŝpinturnilon.
Ŝi malfermas sian manon al la malriĉulo
Kaj etendas siajn manojn al la senhavulo.
Ŝi ne timas la neĝon por sia domo,
**Ĉ**ar ŝia tuta domanaro estas vestita per ruĝa teksaĵo.
Ŝi faras al si kovrojn;



Delikata tolo kaj purpuro estas ŝiaj vestoj.
Ŝia edzo konata ĉe la pordego,
Kie li sidas kune kun la maljunuloj de la lando.
Ŝi faras teksaĵojn kaj vendas,
Kaj zonojn ŝi donas al la komercisto,
Fortika kaj bela estas ŝia vesto,
Kaj ŝi ridas pri la venonta tago.
Ŝian buŝon ŝi malfermas kun saĝo ;
Bonkora instruo estas sur ŝia lango.
Ŝi kontrolas la iradon de aferoj en sia domo,
Kaj ŝi ne manĝas panon en senlaboreco.
Leviĝas ŝiaj filoj kaj ŝin gratulas;
Ŝia edzo ŝin laŭdegas, dirante:
Multaj filinoj estas bravaj,
Sed vi superas ĉiujn.
**Ĉ**armeco estas trompa, kaj beleco estas vantaĵo;
Virino, kiu timas la Eternulon, estos glorata.
Donu al ŝi laŭ la frukotoj de ŝiaj manoj ;
Kaj ŝiaj faroj ŝin gloros ĉe la pordegoj.

# Tago de Esperanto 2024: Mesaĝo de UEA

## Por mondo por ĉiuj lingvoj kaj sen lingva diskriminacio

La artikolo 2-a de la deklaracio pri homaj rajtoj, klare asertas, ke "ĉiuj rajtoj kaj liberecoj difinitaj en tiu ĉi Deklaracio validas same por ĉiuj homoj, sen kia ajn diferencigo, ĉu laŭ raso, haŭtkoloro, sekso, lingvo, religio, politika aŭ alia opinio, nacia aŭ socia deveno, posedaĵoj, naskiĝo aŭ alia stato."

Tio en si mem klare kondamnas la neadon de lingvaj homaj rajtoj al popoloj, grupoj, etnoj, komunumoj malgrandaj, malfortaj, politike ne influaj, kaj pozitive asertas la bezonon batali kontraŭ lingva diskriminacio.

Kio estas lingva diskriminacio? Ĝi okazas ĉiufoje kiam homoj pli fortaj, pli potencaj, pli kleraj, pli riĉaj parolas en siaj gepatraj lingvoj al aliaj alilingvaj homoj, kiuj provu kompreni kaj provu respondi, se ili kapablas. Temas pri maljusta traktado de aliaj homoj, kiu estas same antikva kiel sklaveco, malalta taksado de virinoj, senpuna mortigo de malfortuloj, ekonomia




ekspluatado de malfortaj landoj, rasismo, kaj similaj maljustaj praktikoj.

Sed estas unu diferenco kompare kun aliaj diskriminacioj: lingva diskriminacio estas ofte ne rekonata de tiuj, kiuj diskriminacias kaj eĉ de tiuj, kiuj estas diskriminaciataj.

Unuiĝintaj Nacioj mem, kiu estas la sola dialogo-punkto, pri kiu disponas nia planedo, ne plene aplikas tion, kion la deklaracio pri homaj rajtoj implicis: ĉies egaleco kompreni kaj esti komprenata. Ĝi havas kelkajn grandajn lingvojn kiel oficialajn lingvojn, sed fakte ĝi utiligas nur kelkajn el la plej grandaj por paroli al la mondo. Sekve, ĝi emas aŭskulti nur tiun etan parton de la mondo, kiu kapablas respondi en tiuj plej grandaj lingvoj. Ĉu tio estas la plej efika maniero por mobilizi mondajn civitanojn por atingi solvon de monde gravaj problemoj, ekzemple la Celoj por Daŭripova Evoluigo , la dialogo pri la klimato aŭ la serĉo de paco?

Kelkaj gvidaj afrikaj politikistoj tute klare agnoskis la rilaton inter la uzo de gepatraj lingvoj kaj evoluo, kiel Nyerere kaj Mandela, kiu iam diris: "Se vi parolas al homo en lingvo, kiun li komprenas, vi parolas al lia kapo, sed se vi parolas al li en lia

lingvo, vi parolas al lia koro."

Kaj ni bezonas mobilizi la korojn ĉirkaŭ la celojn de Unuiĝintaj Nacioj.

La solvo, kiun proponas la parolantoj de la neŭtrala monda lingvo Esperanto estas eble tro estonteca por esti tuj aplikata grandskale, sed indas interesiĝi pri ĝi, ĉar ĝi estas lingvo kreita por ke en la mondo ĉiu rajtu paroli sian lingvon ĉe si sen la premo de grandaj lingvoj. Esperanto estis kreita por ke ĉiuj lingvoj vivu, kaj por ke la dialogo inter malsamlingvaj grupoj okazu sen premo de unu al la alia sed en egaleca maniero, sen diskriminacio.

Ni ne alvokas, okaze de la ĉi-jara Tago de Esperanto, la 26-an de julio, ke vi lernu Esperanton simple por lerni plian lingvon, eĉ se ĝi estas relative facila, sed por kompreni kio estas lingva diskriminacio, kiu praktikas ĝin kaj kiel oni povas superi ĝin per egaleca komunikado.

https://esperantoporun.org/eo/esperanto-tago-2024/




**-- HUMURAĴOJ --**

**GENERALA LERNANTO**

La lernantoj de la dua klaso skribas.

La instruistino rimarkas, ke Peĉjo sidas sen fari ion.
Ŝi diras al li:
- Vi denove venis sen krajono!
Kion vi dirus pri soldato, kiu irus sen pafilo al la ekzercejo?
- Mi dirus ke li estas Generalo!

**KLIENTO**

Unu viro iris en la bazaron kaj stariĝis antaŭ la fruktovendistino. Li salutis kaj demandis, ĉu vi konas min? La vendistino respondis: ne, mi ne konas vin. Tiu viro miris kaj diris al ŝi, kiel vi ne konas min? Mi ja estas via kliento!

# Pri la unua kaj unika UK en Afriko




Kiel la tutkontinenta afrika esperantistaro, la konga ankaŭ aliĝis al la komuna ĝojego utile kunlabori por la efektiva okazigo de la unua kaj unika, historia universala Kongreso de Esperanto en Afriko.
Tuj post aprobi Tanzanion kiel la ĉi-jaran kongreslandon, mobilizadoj komenciĝis en D. R. Kongo por gaje gastigi tiun mojosegan Esperanto-eventon kaj kontribui al iu tasko laŭbezone, multaj montriĝis kunlaboremaj. D. R. Kongo estas unu el landoj kun multaj talentaj junuloj, kiuj agadas en diversaj kampoj de la tutmonda esperantista movado. Tial sin ne detenis nek neis; multaj junuloj aliĝis kaj partoprenos la Universalan Kongreson el Lubumbaŝo, Centra Kongo, Uvira, Kinŝaso, Goma, Rutshuru, Bukavu. Tio signifoplene montras, ke D. R. Kongo estas lando, kiu grande kontribuas al la movado danke al ĝiaj aktivuloj kontinent-skale kaj mond-skale. La konga esperantistaro kore dankas al la Estraro de UEA, kiu malgraŭ kritikoj kaj antaŭvideblaj defioj okazigi la kongreson en Afriko, tamen decideme decidis honori Afrikanojn per tiu kongreso kaj starigis fonduson por finance subteni la partoprenantojn el Afriko. Gratulojn al UEA, elkoran dankon al la estraranoj de UEA kaj TEJO pro la subtenado de kongaj aktivuloj por la UK.

## Kongolandano partoprenos IJK-n




En ĉiu jaro en D. R. Kongo aperas E-movada stelulo, kiu brilos kaj servos utile por la Esperanto-movado. Ekde 2016, mi estas unu el la plej aktivaj esperantistaj instruistoj, kiuj senĉese investas energion kaj far-scion por disvastigi la uzadon de Esperanto. Mia ĉefa laboro en Esperantio estas instrui Esperanton, tion mi faras ĉie, kie mi troviĝas. Kiel ĉiu movadkonscia esperantisto, dispolusigi niajn agadkampojn estas mia inspiro, kiu nutras mian laboremon. Mi ĉiam facile adaptiĝas al nova ĉirkauaĵo, tial kie ajn mi estas, mi devas okazigi kurson ĉu virtuale aŭ ĉeeste… Post plurjara agado, jen mi, juna kongolandano, gajnis la konkurson *Partoprenu IJK-n 2024*. TEJO trovis bona la decidon rekompenci min per partopreno en la 80a IJK, kiu okazos en Litovio/Ŝventoji. Mi estas tre danka al TEJO, ĉar krom turismi, mi profitos la okazon konatiĝi, amikiĝi, krokodili kaj eĉ aligatori kun aliaj junuloj el multaj landoj tra la mondo. Nu, post UK, en IJK povas partopreni Kongolando.

***Espoir Ngoma Kasati – Lubumbaŝo***

Rakonto

# Ili lernis de la konduto de la najbaroj

*Joel Muhire - Goma*

Iam vivis kun sia edzino drinkema viro. Li aspektis ĉiam ebria eĉ se li ankoraŭ ne drinkis; kaj li tre turmentis sian edzinon ebriiĝinte. Li batadis ŝin, renversadis kaserolojn de sur la kuirejo, insultadis ŝin; kaj tiu virino neniam gajmienis. La vespero estis la plej malbona tempo de la tago por ŝi, kiam revenadis hejmen la drinkemulo. Ŝi enviadis la aliajn, kies la vivado estis kvieta.

En la proksimaĵo de ilia hejmo vivis profesoro. Li vivis trankvile kun sia edzino; kaj la gefiloj ĝojis havi bonajn gepatrojn, kiuj zorgas amplene pri ili, kaj kiuj havas imitindan konduton.

Iam la kverelema drinkulo pripensis, kial en la domo de la najbaro neniam okazas kvereloj. “Mi ĉiam vidas ilin babili rideteme; kaj illaj infanoj estas ĉiam gajaj kaj sanaj!” li multe scivolis kaj decidis iris spioni, kiel ili vivas.

En iu vespera malhelo li iris al la salona fenestro de la najbaro kaj komencis silente kaŝobservi, kiel ĉio okazas en la domo:

La profesoro estis ĉe la skribotablo legante atente libron; ŝia edzino estis en la kuirejo aranĝante vespermanĝon, sed unue ŝi venigis al la edzo varman kafon sur la tablon kaj reiris al la kuirejo. Minutojn poste, la profesoro senkonscie movis la manon kaj akcidente falrenversis teren la tason kaj rompis ĝin. Li tre bedaŭris kaj ekpetis pardonon al sia edzino kiam ŝi rapide venis por vidi tion, kio okazis:

″Kara edzino, pardonu min. Mi tiom estis absorbita de legado, ke mi ne rimarkis, kiam vi metis la kafotason sur la tablon; kaj jen, mi faligis la tason senscie kaj malpurigis la plankon! Pardonu, mi petas″.

Lia edzino sentis sin pli kulpa kaj ekdiris petege:

Edzo mia; ne zorgu! Vi kulpas pri nenio! Ĉi tio okazis pro mi. Se mi estus dirinta al vi “jen la kafo por vi”, ĉi tio ne okazus. Mi penos ĉiam estis pli atenta.

Ŝi kolektis la rompiĝintajn pecetojn de la taso kaj reiris al la kuirejo.

Tiu spionulo komprenis, ke en la hejmo de la najbaro regas kvieto ĉar ĉiuj sentas sin kulpaj kiam ili iom misiras aŭ fuŝas ion en la domo kaj ĉiel kuraĝas peti pardonon. Li rapide iris al sia domo kaj komencis

rakonti ĉion, kion li vidis ĉe la najbara paro.


Li pentis kaj decidis neniam plu turmenti sian edzinon, kaj promesis ami ŝin dum ilia tuta vivo. De tiam li ĵuris, ke li neniam drinkos ĝisebrie kaj tute ŝanĝis la stilon de sia vivo. Ili komencis vivi trankvile kaj respekteme kun toleremo unu al la alia; kaj ilia vivo fariĝis bonega.

Ili lernis de la konduto de la najbaroj !

# BONECA MENSO

***Honoré Sebuhoro – Rutshuru***





Viro vidas mortantan serpenton en la ardanta fajro kaj decidas liberigi ĝin de la fajro. Tuj kiam li kaptas ĝin, la serpento mordas lin kaŭzante al li teruran doloron. La viro tuj faligas la serpenton kaj la reptilio refalas en la faron.

Ĉe tiu punkto, la viro, ĉirkaŭrigardante, trovas metalan stangon kaj uzas ĝin por tiri la serpenton el la fajro denove, por savi ĝian vivon.
Alia viro, kiu vidis tion, kio okazis, alproksimiĝis al la viro kaj demandis lin: « Tiu serpento mordis vin! » Kial vi provas savi ĝian vivon? »
**La viro respondas**: « La naturo de la serpento estas mordi, sed tio ne ŝanĝos mian naturon, kiu estas helpi ».

Lernita leciono : Ne ŝanĝu vian naturon nur ĉar iu vundis vin. Ne perdu vian bonecon de menso, sed lernu agi singarde.



**Honoré Sebuhoro** estas unu el la pioniroj de Esperanto-movado en Rutshuru, fondinto de Verda Stelano-Klubo.



# Leciono pri la Svahila : Salutoj



***Joel Muhire - Goma***

## 1. Oftaj salutoj:

| SALUTOJ | RESPONDOJ |
|---|---|
| **Jambo**! = Saluton! | **Jambo**! = Saluton ! |
| **Jambo Bwana** = Saluton, sinjoro | **Jambo**! = Saluton/  bonan tagon ! |
| **Jambo Mama** = Saluton, Panjo | **Jambo**! = Saluton/  bonan tagon ! |
| **Salama?** = kiel vi fartas? | **Salama**! = bone ! |
| **Mambo (vipi)?** = kiel vi fartas? | **Poa tu! / Safi!** = Estas bone! |

Sed ĉi-supraj salutoj estas nur por turistoj! Kiam ajn eblas, uzu la jenajn salutojn, pli "aŭtentikajn", kiuj faros vin vera *"svahilano":*

- **Hujambo**! = Kiel vi fartas? - **Sijambo**! = Mi fartas bone!
- **Hamjambo**! = Kiel vi fartas? - **Hatujambo**! = Ni fartas bone!
- **Shikamoo**! = Miaj respektoj! (al pliaĝulo) - **Marahaba**! = Dankon.

***Noto :*** la litero J prononciĝas kiel **ĝ** de Esperanto, aŭ pli precize kiel **dj** !

## 2. Interŝanĝado de novaĵoj

Ĉi tiuj simplaj salutoj ofte estas sekvataj de pli specifaj demandoj, pri la horo de la tago, sano, familio, infanoj, ktp.
Por fari tion, ni uzas demandojn komencantajn per la vorto ***HABARI*** kiu signifas ***"novaĵo(j)".***

**Estiĝas du kazoj**:
Se ni atendas precizan respondon, ni uzas ***Habari ya...? (= Kio nova...?),***
Se pro ĝentileco ni faras demandojn sen specifa intenco, ni uzas ***Habari za...? (= Kiuj estas la novaĵoj pri...?).***

- **Habari?** - Kio novas ?
- **Habari gani?** - Kiel vi fartas ?
- **Habari yako / zako?** - Kiel vi fartas ? kio nova ?
- **Habari ya (za) leo?** - Kiel vi fartas hodiaŭ ?
- **Habari ya (za) asubuhi?** - Kiel vi fartas (matene) ?
- **Habari ya (za) mchana?** - Kiel vi fartas (posttagmeze)?
- **Habari ya (za) jioni?** - Kiel vi fartas (vespere)?

| | |
|---|---|
| **- Habari ya (za) safari?** | - Kiel estis via vojaĝo? |

Krom en okazo de malfeliĉo (morto, grava malsano, ktp.), ni senescepte respondos per: **Njema!** aŭ **- Nzuri!** aŭ **- Salama!** = Ĉio estas en ordo.

## 3. Aliaj komunaj esprimoj:

| | |
|---|---|
| - **Asubuhi njema** | - Bonan matenon |
| - **jioni njema** | - Bonan vesperon |
| - **Hamjambo nyumbani?** | - Kiel fartas via familio ? |
| - **U hali gani?** | - Kiel vi fartas ? |
| - **U mzima?** | - Ĉu via sano estas bona? Ĉu vi bonfartas ? |
| **- (Ni) mzima** | - Mi fartas bone. |
| **- Na wewe?** | - Kaj vi ? |
| - **Na wewe pia?** | - Kaj ankaŭ vi (ĉu vi ankaŭ fartas bone)? |
| - **Haya!** | - Bone ! |
| - **Naam!** | - Jes? (Responde al voko) |
| - **Ndiyo** | - Jes |
| - **Siyo / Hapana** | - Ne |
| - **Tafadhali** | - Bonvolu |
| - **Asante (sana)** | - Dankon (multe) |
| - **Hamna shida** | - Ne gravas |

Kiam homo estas malsana aŭ priploras mortinton, oni diras al li:
**- Pole!** – mi bedaŭras, kondolencojn!
**- Pole na msiba wako**! - Miajn kondolencojn !

Kiam homo vojaĝas, ni ankaŭ povas diri al li:
**- Safari njema**! - Havu bonan vojaĝon !

La atendata respondo estas kompreneble:
**- Asante!** - DANKON !

## 4. Vizitante iun:

Por anonci vian ĉeeston ĉe ies hejmo, oni diras frapetante la pordon:

- **Hodi!** - Ĉu enestas iu?

Al kio la persono respondas:

| | |
|---|---|
| **- Karibu!** | - Bonvenon! Envenu ! |
| **- Karibuni!** | - Bonvenon! (kiam temas pri multaj homoj). |
| **- Starehe!** | - Sentu vin hejme! |

Al kio ni ĉiam respondos:

- **Asante!** - DANKON !
- **Asanteni!** - DANKON ! (al pluraj homoj)

## 5. Adiaŭ:

La vorto por adiaŭi estas **Kwa heri!** kiu laŭvorte signifas: "**Bonan sorton**!"

| | |
|---|---|
| - **Kwa heri!** | - Ĝis revido! (al homo) |
| - **Kwa herini!** | - Ĝis revido! (al pluraj homoj) |
| - **Kwa heri ya kuonana**! | - Ĝis baldaŭ ! |
| - **Tutaonana!** | - Ni revidos unu la alian. |
| - **Tutaonana kesho.** | - Ĝis morgaŭ ! |
| - **Asubuhi njema.** | - Bonan matenon ! |

Kiam ni disiĝas vespere, ni povas deziri:

| | |
|---|---|
| - **Jioni njema** | - bona vesperon ! |
| - **Usiku mwema!** | - Bonan nokton ! |


Antaŭ ol dormi, vi ankaŭ povas deziri al iu:
- **Lala salama**! - Dormu bone !

## *Ekzercu vin !*

***Traduku al la suahila:***


1. - Saluton! Kiel vi fartas ? - Mi fartas bone.
R/
2. Kio pri via hejmo (familio)?
R/
3. Miaj respektoj - Dankon.
R/
4. Ĉu iu enestas ? - Bonvenon!
R/
5. - Kiel pri via sano? - bone.
R/
6. - Saluton! - Saluton!
R/
7. - Ĝis morgaŭ!
R/
8. - Bonan nokton, dormu bone! - Dankon ankaŭ al vi.
R/


## Kelkaj libroj kaj DVD-j de kongolandaj aŭtoroj











# Konga Espero:

*Trimonata informilo de DKEJO (Demokratia Kongolanda Junulara Organizo) eldonata kunlabore kun aliaj kongolandaj organizoj.*
Redaktoroj : Joel Muhire, Kongolanda ILEI-sekciestro kaj Espoir Kasati, Sekretario de DKEJO.

Kontaktoj: *joelmuhire0@gmail.com*, *espoirkasati@gmail.com*.

Kontribuis al ĉi tiu informilo: Joel Muhire, Espoir Ngoma Kasati kaj Honoré Sebuhoro.

Tanzanio, la 109a Kongreslando

**Aruŝo, 3-10, Aŭgusto 2024**





